

Año III (N.° 36)

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 12


DICIEMBRE 1951


RUZAFA, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

ĜOJAN KRISTNASKON

KAJ

MULTE DA FELIĈO DUM LA NOVA JARO 1952





Calle (Strato) del Dr. Zamenhof en Valencia

AL DR. ZAMENHOF

EN SU 92 ANIVERSARIO

En esta conmemoración del nacimiento del Dr. Zamenhof, glorioso creador del idioma Esperanto, abrimos joviales el libro de la vida de aquel hombre, que fué relevante figura filantrópica y sobresaliente impulsor de la cultura. Al hojear las efemérides de su existencia, resaltan en todas y cada una de sus acciones, desde la más insignificante hasta la más trascendental, una indomable voluntad, una férrea constancia y una bíblica paciencia, envueltas en el manto de la más profunda bondad y del más puro espíritu humanitario, sin el más pequeño asomo de egoísmo.

Quien tanto dió a la Humanidad, sin pensar para nada en su propio provecho, recibió como premio a sus desvelos muy pocas rosas y muchísimas espinas, nacidas del tallo de la envidia o de la ingratitud. La tierra da con parquedad seres de su temple. Los santos, los heroes, los sabios y grandes bienhechores son como raras flores silvestres en campo de abrojos. Y el autor del Esperanto tenía grandes dotes y cualidades de todo eso: de santo, de sabio, de heroe y, muy especialmente, de bueno.

Diciendo esto, no pretendemos exagerar sus virtudes, con arrebatos místicos, ya que él hubiese sido el primero en rehusar tales transportes de mesianismo, siendo como era un hombre de vida sencilla, sin apetencia alguna por el mundano oropel de públicos honores y agasajos, aunque poseía preciadas condecoraciones de casi todos los países europeos, entre las que merece destacarse el Gran Collar de la españolísima Orden de Isabel la Católica, concedido por S. M. el Rey D. Alfonso XIII.

En este 15 de Diciembre, sin embargo, exaltamos su recuerdo con fervoroso afecto, rindiendo a su maravillosa obra el homenaje de nuestra admiración, prometiendo seguir laborando por la difusión del Esperanto, como segundo lenguaje para todos; siendo esta la forma más eficiente de honrar la memoria del Dr. Zamenhof, realizador de un sueño, en su ejecutoria de trabajo, bondad y sensatez...

EN LO QUE AUXILIA EL ESPERANTO

Breve respuesta al Sr. N. A. de Tarrasa

Si todo el mundo, o poco menos, opina que el uso del Esperanto debiera generalizarse, y hasta ser declarado obligatorio por parte de los gobiernos, no todos están acordes en que su estudio reporte actualmente alguna ventaja positiva a quien lo haya aprendido. Si podemos asegurar que aquellos que dicen que el Esperanto no les gusta, es que no lo conocen ni por el forro, podemos también afirmar, sin temor a equivocarnos, que los que dicen que el idioma auxiliar no auxilia a nadie, no han estado nunca entre varios esperantistas extranjeros, ni han asistido a un congreso internacional. Esto es, que se lanzan a opinar sobre un asunto que no les es simpático, por esto o lo otro, pero que demuestran desconocer en absoluto. Y si la opinión es de un señor que se firma N. A., está más claro que el agua: es que de eso, de lo cual opina, no sabe "ná".

Aun para aquel esperantista que vive aislado en una aldea, sin contacto directo con otros idealistas como él, el conocimiento del Esperanto le reporta una satisfacción inmensa, y el medio de convertirle, por la correspondencia y el círculo de amistades en todo el mundo, en un ser cosmopolita, aunque nunca haya salido de su villorrio. Para aquellos que, conociendo el Esperanto, han podido comprobar, en sus viajes por el extranjero, la gran utilidad que les reporta, no solo por la facilidad de comprensión, sino por la atmósfera fraternal en que se desenvuelven, gracias al idioma auxiliar, las afirmaciones y las divagaciones de todos esos "Señores N. A." suenan a hueco e inconsistente.

Como reciente botón de muestra del "auxilio" que proporciona el idioma auxiliar, vamos a reseñar sucintamente el viaje por España de la señora Patricia de Cleene, viajera neozelandesa que, a través de medio mundo, ha comprobado la utilidad práctica del Esperanto. Desde Niza vino a España con una compañera sueca que, además, conoce el inglés, el alemán y algo de francés. Pues bién, la señorita sueca no esperantista solo podía hacerse comprender en los hoteles, mientras que ella encontró siempre esperantistas que la han recibido y acompañado a todas partes: la muchacha sueca encontró también los beneficios del esperantismo al caer enferma, puesto que un médico esperantista la asistió con todo interés y desinterés, por ser amiga de la Sra. de Cleene. Los hechos convencen más que las teorías, y la muchacha sueca manifestó su convencimiento de la utilidad del idioma auxiliar, y su decisión de aprender el Esperanto. A pesar de sus conocimientos idiomáticos, nunca hubiese sospechado que, en todas partes, fuesen a esperarla a la estación —aun a horas intempestivas— que luego les indicasen el hospedaje y que en los hoteles discutiesen la cuenta en defensa de su bolsillo. En suma, que la tratasen con amistad. Con todo su bagaje idiomático, hubiese sido una extraña en todas partes, a no ser por la ventaja que le deparó el ir en compañía de una esperantista.

Desde que se fundó la Federación Esperantista Española, han desfilado por Valencia: franceses, ingleses, holandeses, alemanes, daneses, noruegos, suecos, norteamericanos, etc. Tan solo se valieron del idioma auxiliar, y por él encontraron calor familiar, consejos, compañía, y cimientos de amistad perdurable. Esto no son teorías sino hechos concretos, que demuestran el auxilio que proporciona el idioma auxiliar a las personas que lo usan y practican.

Ahora bien; no hay peor sordo que el que no quiere oir, ni peor ciego que el que no quiere ver. Y... naturalmente, lo mismo aquí que en Bogotá: N. A. ¡NÁ!

INTERLINGVA PARALELO

ORIGINALO

La vida y la inteligencia se van derrochando en empresas inútiles, pero cuando el hombre que las ha derrochado se encuentra con personas económicas y prudentes, ve que tampoco estas han ganado la partida y que su éxito no vale gran cosa.

De las Memorias del famoso escritor Pio Baroja

TRADUKO

La vivon kaj la inteligentecon oni daŭre malŝparas en entreprenoj senutilaj; sed kiam tiu homo, kiu ilin malŝparis, renkontiĝas kun personoj ŝparemaj kaj prudentaj vidas, ke tiuj ankaŭ ne gajnis la partion kaj ke ilia sukceso ne valoras multe.

El la Memorajoj de la fama verkisto Pio Baroja

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● FRANCIA.—«Syndicat d' Initiatives», de Thiers (Puy-de Dome), ha publicado un folleto sobre la ciudad, en francés y Esperanto, el cual puede solicitarse de dicha oficina.

● BELGICA.—«Acta Orthopédica Belgica», revista médica de Bruselas, publica sus números con resúmenes detallados, en el idioma internacional, de los artículos insertos, con lo que se transforma en una revista muy interesante de amplio campo divulgador.

● ALEMANIA.—Están teniendo lugar distintos cursos en la Escuela Técnica Superior y en la Universidad de Munich. La agencia oficial «Verkehrsamt der Stadt Köln» ha editado un folleto turístico en Esperanto sobre la ciudad de Colonia, encrucijada de los caminos de Europa. Puede recibirse gratis escribiendo a dicha oficina: Domklosterstrasse, 3.

● CHECOESLOVAQUIA.—Se ha hecho ya la segunda edición del interesante folleto «Trenĉin bonvenigas vin», publicación turística de "Slovakotour" sobre esta ciudad.

● AUSTRIA.—El doctor Adolf Halbedl, de Knittelfeld, ha escrito la interesante obra "Papo Pio X, beata", biografía en Esperanto del mencionado pontífice que ya en 1906 aprobó el idioma auxiliar, como lengua neutral de intercomprensión humana.

El doctor Peter Schwarz compuso con ocasión del último Congreso Esperantista austriaco las piezas "Esperanto-Festomarŝo" y "Esperanto-Kongres-Valso"; de esta segunda pronto se editará la partitura para piano, por el éxito obtenido en sus primeras audiciones.

En el verano de 1952 será inaugurado en Wörgl un monumento en honor del Doctor Zamenhof, el primero que se erigirá en Austria al creador del Esperanto. Deben ser dadas las gracias al apoyo que presta toda la población a nuestro movimiento, dirigiéndolas al alcalde de dicha localidad: señor Kom. Rat. Martin Pichler - Bürgermeister WÖRGL (Tirol).

● CANADA.—En "The Globe and Mail", diario de Toronto, se ha iniciado una información sobre "El Esperanto como idea práctica», cuyo resultado ha sido la animación del movimiento en pro de un idioma auxiliar universal y la creación de un club en la ciudad.

● ESTADOS UNIDOS.—La conocida revista gráfica "Life" está realizando propaganda a través de todo el mundo. A doble columna, en inglés y... Esperanto, presenta a sus futuros lectores-suscriptores las cualidades de la revista y su contenido internacional.

"The Scientific Monthly", revista de divulgación científica, en sus números de Marzo y Julio del año actual ha publicado artículos sobre el Esperanto como idioma internacional, vínculo favorable en las relaciones científicas. En "Trenton Central High School", de Trenton (New Jersey), se ha organizado un curso de la lengua auxiliar para este invierno, entre los estudiantes de dicha Escuela Superior que siguen las lecciones con interés.

● NICARAGUA.—Se ha constituído en este país centroamericano, la primera Asociación Esperantista, cuya sede radica en la "Casa de la Cultura", de la capital Managua.

● GUATEMALA.—El Departameuto de Bellas Artes del gobierno guatemalteco patrocina una exposición internacional de dibujos infantiles, para cuya realización y difusión, con el resto de países no americanos, se vale del Esperanto, como idioma de relación.

● BRASIL.—Durante el IV Congreso de Periodismo, celebrado en Recife del 5 al 12 de Mayo último, se adoptó una resolución a favor del idioma auxiliar, a fin de establecer y organizar cursos en las Asociaciones de la Prensa, recogiendo en los periódicos noticias y colaboraciones. En el Colegio "Monseñor Walfredo", de Joao Pessoa, se ha constituído un Club de Esperanto, al que desde el primer momento se inscribieron 250 colegiales.

● ARGENTINA.—La Junta Directiva de la Asociación Esperantista de Buenos Aires hizo una visita a la Sociedad Japonesa de aquella capital, especialmente invitados por el prestigioso periodista y esperantista Sr. Katsuo Miyachi, director del periódico en lengua japonesa "Akoku Nippo" que se publica allí. La visita tuvo por objeto organizar un curso de prueba entre el elemento juvenil de la colonia japonesa. El éxito fué completo; la jornada tuvo una duración de seis horas, en dos partes: una por la mañana bajo la dirección del propio Sr. Miyachi, y la otra por la tarde con varias explicaciones de los más competentes. esperantistas bonaerenses. Después de esta prueba inicial, para demostrar la lógica y sencillez de la gramática esperantista, se ha organizado un curso especial para la simpática juventud japonesa residente en la ciudad del Plata. Reina gran entusiasmo entre los noveles samideanos, que hacen ya proyectos para organizar una propaganda en gran escala.

Nuestro lema: Cada cual con su idioma, pero... ¡el ESPERANTO para todos!

XIII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

EN VALENCIA

26-27-28-29 DE JULIO DE 1952

Atendiendo a diversas sugerencias recibidas, sobre los días de su celebración, se ha efectuado un pequeño cambio de fechas, anulándose las anunciadas en el número anterior, y quedando ya como efectivas las arriba indicadas, que esperamos sean más convenientes y oportunas para todos.

Mientras siguen su curso los trámites legales, ofrecemos hoy a nuestros amigos, como un anticipo del definitivo, el siguiente

PROGRAMA PROVISIONAL

Día 26 de Julio - Sábado

A las 10: Recibimiento de los Congresistas.
A las 11: Recepción oficial en el Ayuntamiento.
A las 12: Visita al Archivo Municipal.
A las 13'30: Vino de Honor.
A las 18: Apertura del Congreso y primera sesión de trabajo.
A las 23: Asistencia a los festejos de la Feria.

Día 27 de Julio - Domingo

A las 10: Misa, con sermón en Esperanto.
A las 11: Fotografía colectiva.
A las 12: Descubrimiento de una lápida en la calle del Dr. Zamenhof.
A las 14: Banquete Oficial.
A las 17: Certamen Literario.
A las 23: Asistencia a los Festejos de la Feria.

Día 28 de Julio - Lunes

A las 11: Visita a los Museos.
A las 17: Segunda sesión de trabajo y clausura del Congreso.
A las 23: Asistencia a los Festejos de la Feria.

Día 29 de Julio - Martes

A las 10: Excursión, todo el día, a la playa del Saler, Dehesa y lago de la Albufera.
A las 22'30: Velada de despedida.

Se gestionará, y probablemente se conseguirá, una importante rebaja en los ferrocarriles, asimismo podemos garantizar un perfecto servicio de hospedajes, estudiándose incluso la posibilidad de establecer dos alojamientos colectivos, (uno para hombres y otro para mujeres) a precios sumamente módicos, siempre a base de comodidad y limpieza.

Tan buenos deseos de los organizadores deben ser garantía, para todos de un máximo de alicientes con un mínimo de desembolsos.

La proverbial hidalguía de Valencia será superada con los esperantistas, que no deben dejar de darse cita a la sombra del Miguelete.

ESCRIBID PIDIENDO INFORMES COMPLEMENTARIOS AL
COMITE ORGANIZADOR DEL
XIII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO
Pelayo, 7, 1.° • Teléf. 19532 • VALENCIA

INTER LA PROZ

Potencaj fortoj ripozas nun en la sino de la tero: foren forflugis aromoj, dum la koloroj stompis helecojn, oferante ilin al la virga blankeco de neĝo. Haltis la triloj, ĉesis la bruo... venis la vintro! Tamen, la naturo estas eterna provizo da emblemoj, eĉ por tiuj homoj, kiuj, loĝante en grandegaj ĉefurboj, scias malmulte pri la perfekta estetiko de plej simpla insekto aŭ plej sensignifa kreskaĵo. Pro tio, kiam la naturo dormas en kamparo, oni vokas ĝin artefare en la urboj, ĉe montrofenestroj de luksaj bazaroj aŭ tute modestaj butikoj. Svarme tie grimacas la bildoj naivaj de tre fantaziaj pejzaĝoj, laŭ kvanto sennombra, sur presita kartono de kartoj, kie dancas steloj, petolas bestetoj kaj flagras kandeloj, tra pentritaj folioj grimpantaj inter sonoriloj el latunpapero, en pozo de daŭra deĵoro, por gratuli konatojn dum la solenaj tagoj, kiam oni celebras naskiĝon de Kristo.

En penso mi vidas la vastajn arangôjn por tiu granda festo, en penso mi aŭdas la infanajn kristnaskajn kanzonojn kaj, ankaŭ en penso, mi frande gustumas la dolĉan spicon de pasto el sukero kun firme pistitaj migdaloj; sed... pensoj ne devas delogi la devojn. Sekve, mi turnas la pensojn en agojn praktikajn, legante amason da gazetoj, kaj prezentante ilin al vi en parado.

Pro la soleno de Kristnasko, estu hodiaŭ unualoke la religiaj kolegoj: Jen, ESPERO KATOLIKA aperigas bonegan artikolon sub titolo "Pri Okultismo" kie tre klare, objektive kaj science oni komentas ege interesan temon, ĉar: "Ni travivas hodiaŭ tempojn maltrankvilajn kaj necertajn" tial: "Ĉu ne admirinda estas la potenco de nia animo, kiu povas konigi siajn pensojn tra spaco sen limo? Ni meditas ja ne sufiĉe tiun potencon donitan de Dio al la homo". FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO estas kvazaŭ sindonema misiisto en la najbara franca lando, same kiel BRITA KATOLIKO, pioniro por nia lingvo inter la katolikoj de la brita teritorio. Ĉe fino de raporto, prave oni diras: "Plej forte montriĝis la unueco, kiam la katolikaj esperantistoj preĝis: "Mi kredas en unu Dio!" VOJO-VERO-VIVO, eldono de Internacia Katolika Informejo, klarigas, laŭ juĝo de la Katolika Eklezio, demandojn pri gravaj temoj, kiel: libroleĝo, la Apostola Eklezio, la Rotary-Movado, la eksedziĝo, k. t. p. DIA REGNO, la kristana gazeto, prezentas lertan kompilon pri la 4ª Konferenco de K. E. L. I. kun abundo da bildoj kaj instruaj tekstoj; kiel kutime, ĝi estas loge

presata sur bonkvalita papero, kiun mi rigardas kaj tuŝas kun envieto; ĉu granda mia peko? LA PONTETO estas monata folio de la franca kristana sekcio, kiu per tre bona lingvo diras tre bonajn vortojn. Nun, jen la internaciaj revuoj: Post bedaŭrinda paŭzo, LA PRAKTIKO reaperis kun la bela kostumo de sia bona enhavo kaj multenombro da paĝoj. La financaj malhelpoj ankaŭ ne estas novaĵo por la organo de Universala Ligo, ĉar la krizo de la nuna tempo efikas pli danĝere sur idealistajn entreprenojn; tial estas prava la averto, ke "La sorto de LA PRAKTIKO estas en manoj de ĝiaj legantoj". Mi esperas, do, ke tiuj manoj estos helpopretaj; tiamaniere, la plej impone belaspekta gazeto de nia movado reguligos kaj sekurigos sian aperadon. Estu tiel! en ĝia plej freŝa numero abundas la kliŝoj, kio, plibeligante la aspekton, ankaŭ ŝarĝas la budĝeton. Kun ornamo de belegaj fotoj estas artikolo pri Barcelono, de S-ro D. Dalmau, kaj alia pri Lisbono, de S-ro Saldanha Carreira, la kompetenteco de ambaŭ aŭtoroj kaj la propra suko, kiun liveras la temo, estas sufiĉa garantio pri altkvalita varo. Forte mi esperas, post ne multe, saluti la aperon de plia numero, tiel plaĉa, kiel ĉi tiu, kiu nun ĉarmigas min! Pri alia veterano, mi deziras fari mencion en mia jarfina revuado: HEROLDO DE ESPERANTO, elstara monumento en nia gazetaro, matura frukto de la kapablo kaj persona persisto de S-ro Teo Jung, kies nomo neniel devas fariĝi ekstermoda inter la esperantistaro. S-ro T. Jung neniam konsideris kiel negocon sian gazeton; en momentoj de krizo, eĉ en situacio de deficito, li zorgis kaj atentis pri tiuj samideanoj, kiuj, loĝantaj en tute ne pagopovaj landoj, sopiras tamen al ĝia legado. Pri tiu fakta sindonemo, la hispanaj esperantistoj povis antaŭ du jaroj dankinde atesti. Kaj nun, kiam eblas la pago, mi vokas ilin energie subteni tiun ampleksan gazeton, kiu, aperinte preskaŭ duonmonate, ĉiam kun freŝaj informoj, rajtas sin nomi la sola Esperanto-ĵurnalo. Post miaj plezure faritaj komplimentoj al tiu, tiel nomata, *privata* entrepreno, venas la vico al plenrajta oficialulo: ESPERANTO de U. E. A. kiu ĵus venis al mi en formo de tre plaĉa kaj interesa numero, je memoro al D-ro Zamenhof. Sub titolo: "Ĉu renkontis la Majstron!" sinsekvas la priskriboj de kelkaj veteranoj, kiuj koncize kaj trafe rakontas siajn impresojn, okaze de rekta renkontiĝo kun la Majstro. Legi tiujn paĝojn estas aparta plezuro, ĉar kvazaŭ kajero, forgesita en malnova meblo, ili eligas tiun subtilan arometon de pasinta epoko, kiu, laŭ diro de poeto, estis pli bona ol la nuna... Krom tio, ĉi tiu lasta numero de la jaro multe valoras per si mem, kvazaŭ ekstra donaco, kie literaturo kaj scienco bone harmonias. La nepra neceso plialtigi la kotizojn, kredeble, ne fortimigos la nunajn abonantojn, kiuj, ŝirmataj per kiraso el bonvolo, tuj atakos la drakon de multekosteco. En la listo de oficialuloj, SENNACIULO rangas stare per propraj meritoj; vere, ĝi estas en favora situacio, rilate la purajn neŭtralulojn, pro tio, ke ĝi povas spici la saŭcon per pli pikaj ingrediencoj, kiuj cetere ankaŭ estas pli danĝeraj, se la kuiristo ne estas artisto en la fako. Kaj pri tio, en ĉi tiu kazo, estas nenia dubo! jen do viva gazeto, kun utila enhavo, kiu, se ne ĉiam agrabla al ies privata gusto, prezentas faktojn al ĉies libera konsidero, atentante ĉiam la formojn de bona eduko. Kia, do, pli bona rekomendo? LA JUNA VIVO, organo de la junularo, aperas kun nova vesto, laŭ tre lerta redaktado de junuloj mem, kies facila stilo kaj gaja humoro liveras utilan materialon por gelernantoj en la kursoj. Kaj... bonvolu atenti!: jen nova gazeto, kies manko estis evidenta, INTERNACIA BONHUMORO ilustrita revuo por tutmonda optimismo kaj ĝojo; ĉar tie "oni diras, ke la rido sanigas, kaj ni povas aldoni de nia flanko, ke la rido certe ankaŭ amikigas la homojn kaj la popolojn". Danaj spritaj samideanoj el Kopenhago ĝin eldonas, kun agrablaj desegnaĵoj, kiuj estas gaja regalo por la okuloj, kiel tiuj skizoj de nudaj virinoj, desegnitaj de la dana artisto E. Hansen per gracia kaj simpla linio. Ŝercoj, spritaĵoj kaj anekdotoj abundas, sed ĝi ne estas teda profesia amuzaĵo, sed moderna sentantaŭjuĝa proklamo pri bezono de rido en mondo, kiu multe suferis kaj suferas...

Pro manko de natura ĝojo, oni perdas pli kaj pli la agrablajn sentojn de interhoma solidareco. Oni serĉas amikojn ne ja por trovi resonon de koro al koro, sed por uzi ilin kiel ŝtupojn en la senfina ŝtuparo de hontindaj negocoj aŭ efemeraj vantaĵoj. Sub influo de tia konvinko, ĵaluze mi dorlotas la memoron de ĉiuj miaj karaj geamikoj, kiuj, kvankam dise loĝantaj tra la tuta mondo, spirite min akompanas nun per la milda sonorado de tiuj, antaŭe aluditaj, paperaj sonoriloj, kiuj tintas nur aŭdeble por la delikataj oreloj de fantaziaj estaĵetoj kiel **LA LEGEMA KOBOLDETO**

TRASERĈANTE SCIVOLEME, EN TIRKESTO ĈE KOMODO DE LA AVINO...

HISTORIAJ RAKONTOJ PRI BESTOJ

EL NEDERLANDO

Hundino pripatrinas porkidon (Somero 1951.)

Kamparano havis porkinon kun dekkvar porkidoj. Unu el ili estis multe malpli forta ol siaj gefratoj. Ĉiuj dektri tiel persekutis ĝin, ke ĝi tute ne povis mamsuĉi, kaj pro tio ĝi videble forvelkis...

En Nederlando, preskaŭ ĉiu kamparano posedas gardohundon. Por pagi malpli da imposto, oni kutime instruas tiajn hundojn neniam forlasi la korton aŭ terenon de sia mastro. La hundocikonio, tamen, okaze ricevas mendon kaj scias alporti hundidojn. Preskaŭ ĉiam la mastro mortigas la bestetojn, jam kiam ili apenaŭ naskiĝis...

Tio ankaŭ okazis ĉe domo de kamparano M. kie la seninfana hundopatrino tagnokte serĉadis siajn idojn. La duan tagon, la kamparano ekvidis ion, kio tiel trafis lin, ke li kunvokis ĉiujn proksimulojn eksteren. Kion oni vidis? La hundino fiermiene kaj feliĉe kuŝis sur sia flanko en la sunradioj; kaj, grumbletante pro ĝojo kaj kontenteco, inter la hundinaj kruroj, dolĉe kuŝis la plej malforta porkido!

Je unu mamo post la alia, ĝi satigis sian trinkemon. Kaj, finfine rondventra, ĝi endormiĝis tute trankvila kun sia kapeto kuŝanta sur la hundokapo.

Kelkfoje, tuj dektri aliaj porkidoj intencis atenci ĝian paradizon; sed, neniel ĝenante "sian infanon", la hundino fortimigis ilin montrante sian dentaron nelaŭte grumblante!

I. SCHOON (Haarlem)

Jen estas la tri fundamentaj kondiĉoj por la homa feliĉo: havi ion por fari, ion por ami kaj ion por esperi.

Anonima Sentenco

RECEPTO POR FRANDEMULOJ: SOPIROJ

Ingrediencoj: 845 gramoj da sukero, kvin ovoblankaĵoj kaj unu kulero da citronsuko.

Oni kirlas tre firme la ovoblankaĵojn kun la sukero, aldonante poste la citronsukon aŭ vinagron; oni kunmiksas ĉion forte kaj, sur paperaj muldiloj, oni metas en fornon kun milda varmo. **Manuela Gallardo Gómez (Madrido)**

«BOLETIN de la Hispana Federacio estas certe la plej bele kaj artisme kompostita gazeto de nia movado, pro estetika elekto de diversaj presliteroj kaj bongusta aranĝo de la materialo». **El Esperanto en Skotlando,** *oficiala bulteno de la Skota Federacio Esperantista.*

SFINKSA ANGULETO

POKALO DA NUMEROJ

9 7 3 4 5 6 9	*floro*
3 9 8 1 2 7 4	*interrilatigi*
5 4 2 5 6 8 9	*juvelo*
2 3 2 1 2 7 4	*akumuli*
5 7 2 8 9	*teatra verko*
1 7 4	*prepozicio*
9	*vokalo*
8	*konsonanto*
3 4 6	*adverbo*
7 6 3 9 7 5 9	*en sporto*
1 2 3 4 5 6 7 8 9	*en zoologio*

Por rajti al la premio, sendu la solvojn ĝis 15. Januaro 1952

SOLVOJ DE LA ENIGMOJ EN LA PASINTA NUMERO

ENIGMA KADRO

1 NOMO
2 OBOL
3 MONO
4 OLOT

MISTERA KOLONETO

1 K O V R I
2 R E A L A
3 K A L K O
4 B L E K O
5 L I N K O
6 P I C E O
7 A V I N O
8 P L O R I

La unua lotado de la hispana Loterio okazis en Madrido, kiel publika aranĝo, sabate, la 10an de Decembro de la jaro 1766a.

Viro paŝis kun la vizaĝo ungovundita.
—Kio estas tio? demandis amiko.
—Ho, nenio grava: facila manlaboraĵo de mia edzino! respondis la demandito.

NOKTO EN ĜARDENO

Alte en ĉielo, en lazuro fora.
Helfabelojn teksas lun' en solpromeno.
Florojn kaj arbustojn, vojojn de l' ĝardeno...
Ĉion silkvualas ĝia bril' fosfora.

Kaŝe ĉe l' vojrando, en ŝirmejo flora,
Nevidebla gril' ĉirp-ĉirpas kun kortremo.
Perlas tra l' silento ĝia tinta ĝemo.
Ĉien disruliĝas ĝia tril' sonora.

L' arbfoliaj ĥoroj mutas en kvieto.
Sen ekmov' rigidas ĉiu herbtrunketo.
Ne kliniĝas kronoj de l'-florar' parfuma.

Ĉio pacas, kvazaŭ ĉio sen ekspiro
La lunon kaj grilon ĝuas kun admiro
En ĉi nokto trila, en ĉi nokto luma.

BOĴIDAR VANĈIK (Kroata poeto)

Originala poemo, gajninta la unuan premion en la Belarta Konkurso de la 36a Universala Kongreso

HISPANA KRONIKO

BARCELONO.—Esperanto-Grupo, ĉe la Kooperativo de manteksistoj, aranĝis la 20an de pasinta Novembro belan feston, okaze de la 75a datreveno de la fondiĝo de tiu kooperativo. Oni lerte prezentis la unuaktan komedion "La Ĉiama Kantaĵo" de famkonata kataluna aŭtoro Santiago Rusiñol, laŭ bona traduko de Alfonso Sabadell. Oni disdonis premiojn kaj diplomojn al la gajnintoj en Literatura Konkurso.

La feston malfermis S-ro F. Pujulá, meritoplena poeto kaj pioniro de la kataluna esperantismo. S-ro Delfí Dalmau, ĉiam preta kaj ĉiam vigla aktivisto, faris la ferman paroladon per sia kutima elokventeco kaj eleganta stilo. La multenombra ĉeestantaro ĝuis, do, treege agrablan vesperon, kiu taŭgis, cetere, por revigligi nian movadon en grava kaj dense loĝata kvartalo de la bela kaj klera ĉefurbo de Katalunio.

SABADELL.—Daŭras la kursoj, gvidataj de kompetenta rondo da instruistoj, kiuj ne nur zorgas pri la instruado de nia lingvo en sia urbo, sed ankaŭ tre diligente kaj sindoneme klarigas kursojn en la najbaraj urbetoj Sardanyola kaj Montcada.

CALLOSA DE SEGURA.—En ĉi tiu urbo, sude de la Valencia regiono, la senlaca agado de niaj fervoraj amikoj estas garantio de sekura sukceso. Kursoj funkcias unu post alia. Pri la metodoj estas interese scii; jen la propraj vortoj de la tieaj respondeculoj: "El malnova lernolibro ni prenas difinitan nombron da vortoj. El tiuj ni diktas hispanlingvan temon. La lernanto trovas en tiu temo ĉiujn vortojn, kiujn li parkere jam konas. Li tradukas la temon kaj oni korektas la erarojn, dum aliaj lernantoj aŭskultas kaj ripetas parole la legitan paragrafon. Ĉiu linio apartenas al unu; tiel, ili ĉiuj skribas, legas kaj parolas samtempe". Tra la tuta urbo, Esperanto vivas ĉar ĉie, kie niaj amikoj troviĝas: fabrikoj, stratoj aŭ sportejoj, elstaras ilia varbemo.

Habiendo finalizado el año con el hecho halagueño de haber mantenido la edición del BOLETIN en el plan previsto de un número mensual, alternativamente de 8 y 12 páginas —además de un extraordinario de 16, en honor del Congreso de Tarrasa— creemos conveniente formular para 1952, el siguiente llamamiento a todos los asociados, ante el no menos agradable y reciente acuerdo de la Directiva de no aumentar la cuota federativa:

Formalización de una de estas dos clases de suscriptores, o de ambas a la vez:

a) Pro envío del BOLETIN a Bibliotecas Públicas: Por 25 pesetas al año se remitirán ejemplares a la Biblioteca pública o escolar que se indique. con ello se fomentará el Esperanto en muchas y diversas localidades.

b) Pro envío del BOLETIN a corresponsales extranjeros: Por 30 pesetas se remitirá directamente el Boletin a la dirección que se nos indique, difundiendo así nuestra publicación en los medios esperantistas del exterior:

ESPERANTO KAJ MEDICINO

Mi ĉiam kredis sincere, ke Esperanto taŭgas por kuracisto, pli ol por aliaj. Kreita de kuracisto, nestita amzorge de kuracistoj, jam de ĝia komenco, Esperanto estas la internacia ligilo por la internacia scienco, por la internaciaj bezonoj. Tial, en nia Medicina Kunveno, okazinta en Barcelono, oni decidis aperigi medicinan revuon, kiel eble plej frue, por duoble labori: unue, por rilatigi kuracistojn el diversaj landoj kaj lingvoj; due, por pruvi al la ne kredemaj, ke Esperanto estas la plej taŭga komprenigilo por medicinaj aferoj. Tiucele, mi jam intencis interkonsenti kun japanaj esperantistaj kolegoj, pli multenombraj tie ol ie ajn; sed, ho agrabla surprizo! la respondo alvenis per freŝe aperinta revuo: "MEDICINA REVUO", bele prezentita, zorge aranĝita, kun ege interesa enhavo, frukto de la fame konata strebo de la japana Medicino.

Profo SUZUKI estas la ĉefredaktoro, helpata de Dro CHIBA, Profo NAKAJAMA, Dro MATSUMOTO kaj Vicprofo OUCHI.

Por administrado, turnu vin al S-ro TOMOZI AOSIMA, Sinmati 123, TIBA (Japanio).

Dro R. HERRERO

JARLIBRO DE U. E. A. 1951

DUA PARTO, NEAĈETEBLA; LIVERATA NUR AL LA INDIVIDUAJ MEMBROJ DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

Oportune aperis tiu interesa oficialaĵo; iom eksterkutime, la dua parto de ĉi-jara U.E.A.-jarlibro ne enhavas fakan terminaron, sed nur asociajn kaj ĝeneralajn sciigojn; inter la unuaj, la plej elstara estas "Raporto de la Estraro"; kaj, inter la duaj, interesa "Listo de lernejoj, kie Esperanto estas instruata", krom "Resuma raporto de la progresoj de Esperanto dum la pasinta jaro". Rimarkinda fakto, kiun trapasas eĉ U. E. A., same ol ĉiuj pli etaj asocioj, estas la deficita kasostato. Vere, la ekonomia situacio ĉie estas malbona; kaj tio baras ĉiun administradon; sed, aliflanke, oni povas diri, ke la nuntempa Esperantujo estas aro da eretoj, kio favoras nek la movadon nek la bilancojn; pli bone estus por ĉiuj, ke multaj eretoj kunfandiĝus en kelkajn valorajn asociojn, kio certe estus pli efika rimedo ol plialtigi la kotizojn...

ERNESTO HURTADO

☆ LA LERNEJO

PRILINGVA RUBRIKO

Jam ĉe la sojlo de plia nova jaro, kore mi salutas al ĉiuj karaj geamikoj, kiuj, dum la daŭro de dekdu monatoj, sin turnis al mi kun demandoj aŭ prilingvaj petoj. Mi klopodis ilin kontentigi, laŭ plej bona volo, ĉar la tasko instrui personojn, kiuj ŝatas instruon, estas ne ja laboro, sed plezuro kaj ripozo. Antaŭ la nova periodo, kiu promesplene komenciĝas, mi volas nur diri, ke mi estas je la dispono de ĉiuj komencantoj, admonante ilin ne plu heziti skribi al mi en ĉiu okazo, kiam duboj aŭ gramatikaj malfacilaĵoj malhelpos aŭ ĝenos ilian ĝustan komprenon. **JUAN BOSCH**

CONGRESOS DE ESPERANTO

13ª BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
del 9 al 16 de Febrero de 1952
Av. Guarapes 86 - Edificio Santo Albino 11 andar. sala 1110
Caixa Postal 555 RECIFE (Pernambuco) Brasil

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a DICIEMBRE 1951)

Suma anterior	**3.395**	**Ptas.**
J. Jacobs (Amberes) actualmente en Valencia	15	»
Luis Pérez Requena (Valencia)	50	»
J. Juan Forné (Valencia)	5	»
Esperanto-Grupo Sabadell	35	«
Valentín Alavedra (Tarrasa)	100	»
María Durán (Tarrasa)	100	»
J. Ernesto Guillem (Valencia)	5	»
Filiberto García (Badalona)	25	»
Antonio Pastor (Bilbao)	25	»
José M.ª Bernabeu (Callosa de Segura)	25	»
Manuel López (Callosa de Segura)	5	»
Tomás Apráiz (Bilbao)	15	»
Cecilio Olalla (Bilbao)	10	»
José Roselló (Valencia)	10	»
Jose Pinell (Sabadell)	10	»
Luis Hernández (Valencia)	50	»
Total general	**3.880**	»

En el cierre de la cuenta, a fin de año, y a la vista del buen resultado obtenido, expresamos nuestro agradecimiento por la valiosa ayuda de estas aportaciones voluntarias, gracias a las cuales se ha vencido el déficit inicial y se ha podido mantener, y aun superar, el número normal de páginas. Si no decae el entusiasmo en esta sección, durante el año venidero, el galano aspecto de nuestro BOLETIN será merecida recompensa para todos nosotros.

EL TESORERO-ADMINISTRADOR

Al ĉiu el sia alte taksata amikaro, ĉie ajn en la mondo, por la jaro 1952ª

deziras prosperon, pacon, plezuron kaj sanon
Izak kai Alida Schoon - Harry kaj Henny Van Zijl
OOIEVAARSTRAAT, 9
HAARLEM N (Nederlando)

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

Esperantista Grupo "A. Tellini", dum la "Nacia Kongreso de Italaj Esperantistoj" (6 ĝis 9 - 9 - 1952) organizos ekspozicion de esperantaĵoj. La tutmondaj samideanoj estas petataj sendi salutkartojn, gazetojn, broŝurojn, afiŝojn, faldfoliojn, k. t. p.
Adreso: Via Borgonuovo, 16 - BOLOGNA (Italio)

Turista Asocio "La Naturamikoj", kiu eldonas la gazeton "Migranto", deziras ricevi de la hispanaj esperantistoj artikoleton interesan kaj seriozan pri niaj karakterizaj regionoj; oni ankaŭ akceptos bildojn por ilustri tian artikoleton.
Sendu ĉion al S-RO MART. WIEDENMANN
Herzogstrasse, 74 MUNCHEN 13 (USA - zone) Germanio

"Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj" jam havas 900 membrojn el 16 landoj kaj deziras ekkontaktiĝi kun ĉiuj hispanaj Esperanto-fervojistoj.
Jara kotizo: 3 internaciaj respondkuponoj
Sekretario: S-RO J. LOK
Oitelissstraat, 1081 AMSTERDAM-West. (Nederlando)

Germana esperantisto, loĝanta en Svedio, intencas fari mondvojaĝon kaj ankaŭ viziti Hispanion. Volonte li akceptos invitojn de grupoj aŭ individuoj. Li vizitis ĝis nun 28 landojn kaj ĉie prelegis en Esperanto.
Adreso: RUDOLF PETRI - Nolhagagt, 4-ALINGSÅS (Svedio)

HISPANAJ ESPERANTISTAJ RONDOJ

ATENTU!

S-ro Tadros Megalli, la fama egipta prelegisto, post sukcesa vojaĝo tra norda kaj centra Eŭropo, ankaŭ intencas veni al nia lando. Ĉiuj grupoj aŭ rondoj, interesataj pri lia vizito, bonvolu sin turni al ni, kiel eble plej baldaŭ. Liajn elspezojn, kvankam malgrandajn, devas pagi la koncerna rondo.

Cantos Hnos., Impr.-Valencia - Tel. 30444